

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

◉ dumonata kristana revuo en esperanto ◉ Nro 2 (827) 2001

La Jarraportoj



Vaclav Lamer

Ĉinio • Evolucio • Kroatio • Interreto • ktp.

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala,
kunlaboranta kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Jacques TUINDER

☒ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerck
☎ +31 251 231941; ✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

☒ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,
Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ javadi@worldonline.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER,

☒ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio ☎ +49 7131 162688; ✉ keli.@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto minimume
€ 15,- ☉ Membro-subtenanto € 22,- ☉ Nura abono:
pagante rekte al KELI € 12,- ☉ pagante al
Libroservo € 14,-. Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI ☉ Se estas
en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA)
bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de
KELI ☉ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI:
5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo – ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

☒ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340,
Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33(0)5 49 46 80 21; ✉ diaregno@altern.com.

Manuskriptojn oni sendu **nur al la Redaktoro!**

Abonprezo sen membreco en KELI: € 12,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kaso de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur
la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj,
kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon
kun represo aŭ traduko oni sendu al la
Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado kaj
ekspedado:**

Eldonejo **hejme** Kazimierz LEJA,

☒ pf. 59, PL 41-250 CZELADŹ, Pollando

☎ +48 32 763 37 13; ✉ kleja@post.pl

ENHAVTABELO

- 27 **Mia vojaĝo al Ĉinio kun BTA**
Arne LUNDKVIST rakontas sian
vojaĝon
- 30 **Mallumo**
Ĉu vi spertis blindule?
- 31 **Evolucio de specioj...**
Kiel evoluis evolucio
- 32 **Tre bona iniciato**
Eŭkaristio kaj sakramento
- 35 **La Reĝo, la saĝulo kaj la
burleskulo**
recenzo de Jacques TUINDER
- 37 **Bonvenon en Kroation**
Invito de Mato SPEKULJAK
- 44 **KELI-prezidanto 'evidente'**
vojaĝos al Ukrainio
Jacques TUINDER preparas sian
vojaĝon
- 46 **Esperanto en la interreto**
Bibliaj tekstoj per la reto per Jerry
VEIT
- 48 **Dummilita incidento**
La knabo kaj la militkaptito

REDAKTORAJ VORTOJ

Karaj gelegantoj,

Jam la dua numero de la dua jaro en
la nova formato. Ni ricevis kelkajn rea-
gojn pro la revuo, ĝia aspekto kaj ĝia en-
havo. Ĝia enhavo, fakte, dependas de vi,
ĉar kompreneble mi mem ne verkas la
tuton. Mi do renovigas miajn alvokojn al
kontribuantoj. Mi petas, krome, ke kiam
tio eblas, vi kunsendu bildojn, fotojn.

Ĉinumere vi denove vojaĝos al Ĉinio,
kie vojaĝis Arne LUNDKVIST. Vi tiel povos
mezuri la malsamecojn inter la sveda kaj
ĉina vivmanieroj. Ĉijare, ni kongresos,
denove ekumene, en Zagrebo. Vi legos
ankaŭ pri la lando. Vi legos ankaŭ pri la
esperantista kaj la ekumena vivo.

Bunta numero, ĉu ne?

Ĝis baldaŭ

Philippe COUSSON

MIA VOJAĜO AL ĈINIO KUN BTA

13-20/06/2000

Josef ÖSTBY estis pastro en la Pen-
tekosta preĝejo en Oslo kaj poste en la
Filadelfia preĝejo en Stockholm. Antaŭ
15 jaroj Josef fondis misian so-
cieton, BTA (*Biblio al ĉiuj*), kaj skri-
bis multajn leterojn kun poŝtaj pag-
formularoj.

Vivanta libro estas facile legebla
traduko de la Nova Testamento. Ĝi
estas disdonata senkoste al la malsan-
nuloj en la malsanulejoj por maljunaj
homoj. En 1987 mia edzino Mijntje,
venis al la sekcio por flegado de kroni-
kaj malsanuloj. Tiu malsanulejo si-
tuis en la apudeco de mia domo. Ĉiun
duan semajnon venis grupo de kan-
tantaj homoj el la Pentekosta preĝejo
de Bredäng. Ili havis pian sentadon en
komuna salono kaj ilia pastoro parol-
is kaj disdonis la Testamentojn. Mi
prenis la ekzempleron de mia edzino
kaj komencis legi la Novan Testamen-
ton laŭ biblia studplano en la libro.

Baldaŭ mi kontaktis BTA-n kaj iĝis
monata kontribudonacanto. En la mo-
nata gazeto de la amikoj de *La Biblio
al ĉiuj* mi povis legi pri misiaj vojaĝoj
al Ĉinio. Mi aliĝis kune kun mia ama-
ta Rut kaj ŝia filo Gösta. De Växjö ni
flugis al Arlanda. Unu horon antaŭ la
ekveturo de la aviadilo, je 16.45 ni ko-
lektiĝis antaŭ la pordego al Beijing.
Nun ni povis saluti niajn kunvojaĝ-
antojn. La gvidantoj de la vojaĝo estis
tri. En la grandega aviadilo ni ricevis
bonajn lokojn antaŭ tuko, kie ni po-
vis spekti filmojn. Kelkfoje oni mon-
tris mapon, kie ni povis vidi kie la

aviadilo troviĝis. Post kiam ni ricevis
manĝadon, ili mallumigis kaj ni povis
iom dormi. En bona tempo, antaŭ ol
ni alvenis en Beijing, ni ricevis nian
unuan ĉinan matenmanĝon. Ni devis
senti nin vekigintaj, eĉ se por ni sve-
doj estis noktoto.

Ĉinio kuŝas 6 horojn pli frue ol ni
dum la somero kaj 7 horojn dum la
vintro. Ke la vojaĝo kun la aviadilo al
Beijing daŭris 7 horojn kaj 45 minu-
tojn, signifis, ke ni alvenis al la flughaveno
je 07.15 aŭ je 01.15 sveda tempo.

La unua tago estis la plej peniga pro
la tempa diferenco. Post kiam ni pas-
is ĉiujn pasport- kaj dogan-kontro-
lojn, ni alvenis en la alvenhalon. Tie
MA renkontis nin. Li mendis malgran-
dan aŭtobuson por la grandaj valizoj.
En la granda turista aŭtobuso ni po-
vis lasi nian manpakaĵon. La aŭtobuso
veturigis nin laŭ la aŭtovojo al la cen-
tro de Beijing, kie ni ricevis ĉambrojn
en la Paragon-hotelo. Ni ricevis
ŝlosilojn kaj devis lasi niajn paspor-
tojn. En la akceptejo ni ankaŭ povis
ŝanĝi dolarojn al ĉinaj *juan*-oj. La
valoro de 100 *juan*-oj estas preskaŭ
100 kronoj.

Ni alvenis al la hotelo je la 8-a.
Stulte ni ne eliris por aĉeti trinkaĵojn.
Anstataŭe ni ripozis unu horon. La
aŭtobuso atendis nin ekster la hotelo
je 9.30. Kiam ni forlasis la hotelon ni
sentis kiel la eniron en saŭnon. La
aŭtobuso veturigis nin al la placo de la
Ĉiela Paco. Ĝi certe estas la plej gran-
da placo en la mondo. Ĝi estas plani-

ta por trapparadoj. Ne estas vidindaĵo. Mi prenis fotojn de la prezidanta palaco kun granda bildo de la prezidanto MAO. Ni eniris kaj iom post iom ni venis al la Malpermesata Urbo. Ĝi estas la kerno de la imperiestra urbo, kiu estas ĉirkaŭita de alta muro kaj ringfosaĵo. Nur precipe elektitaj homoj havis la rajton viziti ĝin. Hodiaŭ ĝi estas muzeo, kun grandaj kolektoj de arto kaj artaj manlaboraĵoj. Ĉio estas gardita de la 14-a jarcento. Estis 42 gradoj Celcius en la ombro, kiun ni ne povis trovi. Gvidanto rakontis, kio estis tradukita al la sveda. Daŭris tutan horon. Fine ni venis al sekcio, kie ni povis ripozi sur benkoj en la ombro. Iĝis nur kvaronhoro. Je 12.30 ni povis eniri en la malvarmeta aŭtobuso. Lunĉo estis mendita en restoracio kaj en alia loko por ĉiufoje. Ni ĉiam sidis ĉe rondaj tabloj kun ronda vitra disko en la mezo. Ĉirkaŭ 12 specoj da manĝado venis al la tablo. Ni ricevis stangetojn. Kelkfoje ni sukcesis mendi forkojn. Verda teo estis servata plurfoje. La trinkaĵo enestis en la prezo. La malagrabla nur estis, ke ni devis manĝi sur subtasoj. La manĝado konsistis el forte spicita viando kiel pecoj de kokidaĵo, legomoj multspecaj, maizo kaj rizo. La fiŝo estis bongusta sed havis multe da ostoj. Ĉiam troviĝis vegeterana supo kun florbrasikoj. Kiel fino ĉiam estis akvomelono. La tagmanĝoj, kiujn ni ricevis je la 7-a vespere, konsistis el la samaj produktoj kiel la lunĉoj.

La vesperoj estis liberaj kaj ni povis elekti inter 9 kanaloj en televido. La matenmanĝon ni ricevis duonan ŝtuparon malsupre en la hotelo. Ĝi estis pli riĉa ol ni al kutimiĝis. Panrostaĵo, friti-

ta ovo, butero, pano, mielo, konfitaĵo, ĉena kolbaseto, teo aŭ kafo. Nun ni ricevis tranĉilon kaj forkon.

Ni nun havis pli da tempo por prepari nin por la ekskurso de la dua tago. La aŭtobusvojaĝo al la ĉina muro daŭris duonan horon. Antaŭ ol ni iros la longajn ŝtuparojn al la muro, ni kolektiĝis por esti fotografitaj.

Kelkaj ŝtupoj estis 30 cm kaj aliaj 10 cm altaj. Estis muroj sur ambaŭ flankoj kaj la ŝtuparoj 2 metrojn largaj. Estis facile renkontiĝi. De tempo al tempo ni povis sidiĝi sur la ŝtuparoj, trinki kaj paroli kun la partoprenantoj. Post la unua konstruaĵo mi pli facile povis iri, ĉar la aero ne estis tiel varma. Mi haltis en la dua domo, ĉar ni devis esti ĉe la aŭtobuso post duona horo. Sube mi manĝis glaciaĵon kaj parolis kun amerika paro, kiu grimpis al la unua domo. Montriĝis, ke tri el nia grupo grimpis al la muro kaj pro tio tie ricevis diplomon. La ĉina muro estis konstruita en la dua jarcento antaŭ Kristo sub gvido de imperiestro Shi Huang. La muro estas 4000 km longa kaj 8 metrojn alta. Ĝi estas la plej granda konstruaĵo en la mondo. 300 000 punlaborantoj laboris kun penego kaj mizero.

La aŭtobuso nun veturigiĝis nin al restoracio, kie estis kristnaska arbo kun malgrandaj lampoj ekster la enirejo. Ni prenis fotojn de la manĝejo. Post la lunĉo ni veturis al la MING tomboj. Ĝi ne estis tiel interesa. Sed poste ni veturis al perla fabriko. Konkroj estas breditaj en baseno. La virinoj ricevis perlojn kiel donaco. Kutime ili kaptas la konkojn de la maro kaj ni vidis filmon pri tio. Vespere ni havis kunvenon en la hotelo, kiam ni povis pre-

zenti nin mem. La plej multaj de la 42 gepartoprenantoj estis pentekostanoj. En la sveda membrofolio mi rakontis pri multaj.

Vespere la 16-an, la vojaĝo iris al Baoding, 200 km pli suden. Ni tranoktis unu nokton en la Baoding hotelo. Dum la tempo de ĈANG Kai Ĉek troviĝis misiistoj en diversaj partoj de la lando. Kiam MAO prenis la potenco, la misiistoj devis forlasi la landon. La preĝejoj estis konfiskitaj kaj la misiaj asocioj perdis la kontakton. La Slava Misio sendis bibliojn kaj multaj homoj, kiuj ricevis la bibliojn iris en malliberejon. La neregistritaj domkomunumoj povas kolekti 100 homojn en ĉambro, kiun ili povas lui de fabriko. Ne estas certe diri, kiom multaj ili estas. Tri Mem-eklezioj estas ŝtate kontrolitaj. Biblio estis presitaj en Ĉinio kaj kostas 18 kronojn. BTA laboras oficiale kaj subtenas la registritajn komunumojn. Oni povus nomi ilin baptistaj asocioj. Por iĝi membro oni partoprenas biblian kurson kaj estas baptitaj. La aĝo devas esti pli ol 18 jaroj. La infanoj povas esti en alia apartamento. La katolika eklezio havas 10 milionoj da membroj.

En la provinco Hebei 30000 estis baptitaj pasintjare. En Baoding loĝas 11 milionoj da homoj, 600 mil en la centro. Post la lunĉo ni vidis 100-jaran preĝejon. La estro estas 70-jara pastro, kiu estas malnova amiko de Josef. En la provinco loĝas 32 milionoj da homoj. 305 mil estas membroj de la registrita eklezio. En la provinco troviĝas 106 preĝejoj kaj 48 pastroj.

La komunumo ankaŭ praktikas flegadon de malsanuloj. Flegistino mon-

tris al ni la akceptejon kaj la ĉambrojn por medikamentoj. Unufoje semajne venas kuracisto. La pacientoj ne bezonas multon pagi, ĉar ili estas malriĉaj.

Ni veturas al la Biblia lernejo, kiu situas en la periferio de la urbo. La nombro de la kredantoj kreskas ĉiutage. La aŭtoritatoj nun redonas la posedajojn, kiujn la kultura revolucio konfiskis.

Sabatmatene post matenmanĝo ni veturis al Shijiazhuang. Survoje ni povis vidi la tombojn de Han Tomb en Mancheng. Antaŭ 2300 jaroj vivis imperiestro kun granda potenco. Sur alta monto li konstruigis du tombajn kriptojn unu por si mem kaj alian por sia edzino. La monto estis fermita ĝis 1968, kiam MAO ordonis la militistojn ekzameni la monton kun arkeologo.

Montriĝis, ke la imperiestro trinkis multe da vino. 10 grandaj vinbareloj troviĝas dekstre kaj la vino elsekiĝis. Maldekstre troviĝas du grandaj ĉevaloj. Oni nun metis lignoĉevalojn tie. La relikvujo de la imperiestro estis ornamita de oraj platoj kaj dratoj. Ni aĉetis belan libron pri la vidindaĵo, ĉar ne estis permesate foti. Por veni al la tomboj ni devis veturi per ŝnurvojo. Ĝi estis la plej granda vidindaĵo dum la vizito en Ĉinio.

Dimanĉe ni veturis al preĝejo, konstruita antaŭ unu jaro. La Diservo komenciĝis je la 9-a matene kaj la preĝejo estis plenplena de 3000 vizitantoj. Oni rezervis du benkojn antaŭ la estrado por ni svedoj kaj norvegoj.

La ĥoro havis ruĝajn kaj blankajn vestojn. Kelkajn kantojn ni rekonis. Kvin pastroj estas dungitaj. El tiuj unu estas virino. Ŝi gvidis la Diservon. La pastro predikis tutan horon kaj la tek-

sto estis el Johano 12, kie temas pri la grajno de tritiko. Kelkfoje la homoj aplaudis kaj kriis *Haleluja*. Post la Diservo ni iris tri ŝtuparojn, kie ni ricevis trinkaĵon kaj melonon. Ni ricevis bonan lunĉon kaj poste ni veturis al la Biblia lernejo. Ĝi estos inaŭgurata dum la aŭtuno. Ni kolektiĝis en kunvena ĉambro kun orgeno. 20 gejunuloj kantis por ni kaj ni kantis svedajn kantojn. Kiel kutime ni manĝis melonon. En la Biblia lernejo estas pensiono kaj kostas ĉirkaŭ 100 kronojn monate por ĉiu lernanto.

Je la 4-a posttagmeze ni kolektiĝis en la preĝejo de Hebei. Ĝi estis fondita de sveda pastro SANDSTRÖM. Ĝi enhavas 1000 membrojn. 96-jara virino parolis. Ŝi havis apud si filinon kaj ŝian filon, kiu estas pastro en la preĝejo. Ili planas konstrui novan preĝejon en granda loko.

Lunde la 19-an ni komencis la vojaĝon al nia notelo en Beijing. La lasta tago iĝis la plej longa aŭtobusvojaĝo, 280 km. Post la lunĉo ni veturis al la silka strato, kie ĉio estis malmultekosta, sed ni devis marĉandi. En la ŝtata magazeno mi povis aĉeti bonan pantalonon por 132 *juan*-oj kun helpo de la svedparolanta ĉino.

Marde estis tempo por la hejmen-vojaĝo. La aviadilo foriris je 8.45 al Kopenhago, kie ni eliris dum unu horo. Al Arlanda ni alvenis je 14.45, kie ni adiaŭis niajn geamikojn. Dum la flugado al Kopenhago ni manĝis kvarfoje. La restado en Ĉinio estis granda travivaĵo, kiun mi neniam forgesos.

Arne LUNDKVIST

MALLUMO

Ĉe ni okazis neordinara ekspozicio: La Blindula Asocio invitis vidantojn por sperti blindecon en absoluta mallumo. Kun blindula bastono en la mano mi palpis tra tia mallumo, kian mi kiel vidanta homo neniam antaŭe travivis; nenia spuro de lumo, nenia silueto; miaj okuloj ne trovis lokon por ripozi.

En la unua salono, ĉirpado de birdoj kaj lirlanta akvo vekis en ni la imagon ke ni trairas parkon. Mi fariĝis nesekura. Ĉu mi perdiĝos? Ĉu mi retrovos la eliron? En dua salono, trafikata bruoj kaj la randa ŝtono de trotuaro povis esti en ni la imagon ke ni devas transiri grandan voj-kruĉigon. Mi ektimis. Ĉu nenio okazos al mi? Mi estis plene sen orientiĝo. Ni palpe plu serĉis nian vojon tra salono kun skulptaĵoj, kaj fine ni povis, parolante en la mallumon, mendi ion por trinki.

Miaj okuloj neniel helpis min dum mi iris tra la ekspozicio, kompense miaj aliaj sensoj pliakriĝis: palpi helpe de la blindula bastono, aŭskulti la voĉon de la virino kiu kondukis nin tra la ekspozicio, hazarde tuŝi homojn kiuj iris kun mi tra la mallumo.

En la daŭro de la tempo io ŝanĝiĝis. Mi rimarkis la trankvilan ritmon laŭ kiu mi palpe iris antaŭen, kaj mi miris pri la konfido kiun mi povis montri al fremdaj homoj. Ĉi mallonga sperto de blindeco estis ne nur timiga. Estis bona sperto senti ke mi havas multe pli da ebloj percepti la mondon ĉirkaŭ mi ol nur per la lumo de la okuloj.

Annette BECKER

kun permeso tradukis A. BURKHARDT
el la alternativa adventa kalendaro
„Der andere Advent 2000/2001”

Initiativen zum Kirchenjahr
Andere Zeiten e. V. Hamburg

Evolucio de specioj per elinterna manifestiĝo aŭ per ekstera aldonaĵo?

Mi volas rakonti al vi noveletojn ĵus legitajn en la libro „*dimenticare DARWIN* = forgesi DARWIN, jam tradukota diverslingen”. Antaŭe oni bonvolu ke estu precizigitaj la pozicioj de la aŭtoro. Laŭ li, la natura selektado akcepteblas malgraŭ ke ĝia oportuna aplikado en diversaj kazoj lamus; laŭ li, male evolucio de la specioj, nome transpaso de iu speco al alia, ne estas demonstrita aŭ pruvita; tamen li ne neas la transpason de unu stadio al alia kaj de unu specio al alia, sed ĝi ne okazis per la meritoj de la natura selektado, sed pro tio ke la mediaj ŝanĝoj, ĉiuspecaj ŝanĝoj, apertigis al la origina ĉela enhavo novajn eblecojn sin plidivolvi per senbridiĝo de sia potencialo.

Evolucio jes, sed sen eksteraj aldonaĵoj pere de la natura selektado; evolucio nur pere de la natura manifestiĝo de tio kio jam estis...

La aŭtoro, fakulo pri biologio kaj apudaj sciencoj je diversaj universitatoj, Giuseppe SERMONTI, ne solas en tiu pozicio ĉar li citas eŭropajn kaj amerikajn fakulojn akirantajn pli kaj pli evidenton. Ne konfuziĝu certe tiuj fakuloj kun la sekvantoj de fundamentalismo kiuj oponas evolucion per la dia kreado kvazaŭ evolucio ne povus esti dia verko. La nonteoriuloj, male, rekonas la multigon de la specioj kaj ilian perfektigon laŭlonge de biologiaj epokoj; sed, kiel jam dirite, tio estis okazigita per interna emo de la ĉela dotaĵo sin eljeti al la pli kompleta stato ĵus apenaŭ la ekstera medio tion favoras.

Ĉi tie ne estas alvokata kompetenton por prijuĝi la valoran konsiston de iliaj

argumentoj: interesitoj vidu iliajn publikaĵojn! Ni, male, startigis tiun konversacion (nur noteton) kun la celo konigi noveletojn gracie, el la paĝo 71 de la citita verko. Jen:

Laŭ la instruinventajo, Dio kreis serion de embrioj ĉiuj perfekte egalaj inter si kaj ilin iĝis marŝantaj antaŭ sia trono. Al unuopulo li petis kia beko, ungegoj, dentego, koloŝanĝoj, vivmedio ktp. estas plej dezirataj por la defnitiva adolta formo. Ĉiu prezentis siajn grandegajn aŭ subtilegajn postulojn ĝis kiam antaŭ la trono prezentiĝis la lasta embrio. Tiu ĉi diris al Dio: „Se mi rajtas elekti, mi preferus resti kia mi estas... Mi restus embrio sen defenda laŭ la tuta vivo”. Dio aprobas entuziasme kaj ĝoje konkludas: „Vi restos embrio ĝis la entombigo... Eterne infano, vi restos ĉiupotenca, je nia bildo kaj similo, kaj povos kompreni iujn el niaj doloroj kaj sperti iujn el niaj ĝojoj”.

Komento: Dio kreis embriojn, kiuj ĉion jam havas, iuj sin dotas je novaĵoj kaj fiksiĝas en tiuj kaj tial ne plu aspiras allogon kaj emon al kresko, nur unu ne sin limigas en blokantaj aldonaĵoj por oportune fariĝi kia ĝi jam estas.

La novelo helpas certe la supran sciencteorion... kaj nin bildigas kiel eternajn Peter Pan... kiuj jam havas kion serĉatan kaj volatan.

Resumita, fare de L. MANTAUT
prelego de A. ZECCHIN
ĉe Drogulrekupera Komunumo

Tre bona iniciato

Dank' al Dio pro frato Gerrit BERVELING. Li ĉiam precize kaptas problemon kaj al oniulo sufiĉas disvolvi la temon. Frato Gerrit tuŝas problemon pri doktrino kaj praktiko de eŭkaristio.

Eŭkaristio estas praktiko. Tuta nia vivo estas ja praktiko. Ni komencu pri bapto. Teologoj okupiĝas pri doktrino. Kio estas la bapto? Kio necesas por la valida bapto? Kiam izraelidoj fuĝis el Egiptio, ili ne povis teoriadi ĉe la Ruĝa Maro. **Per la fido ili trapasis la Ruĝan Maron kvazaŭ sekteron** (Heb 11:29) en akvo dronis nekredemaj, **kion fari penante, la Egiptoj dronis**. En la akvo restis ankaŭ iamaj sklavoj, el la akvo eliris liberaj homoj, apartenantaj sole al Dio. Pro tio Paŭlo komparas tion al la bapto. Per la fido ni eniras la bapto, en la akvo restas sklavo al peko (Rom 6:4-6), eliras nova homo, infano de Dio.

Ankaŭ la geedziĝo estas tute praktika afero. Nova Adamo akceptas novan Evan de Dio, kaj simile nova Eva ricevas novan Adamon. Kunligas ilin Jesuo, ĉar **eĉ fadeno triopigita ne baldaŭ disŝiriĝos** (Pre 4:12).

Mi ne emas uzi la vorton sakramento. Ĝi elvokas ideon de iu rito kaj en la kazo de edzeco ĝi dividas Romanojn de Reformaciuloj. Kaj tamen ĉiu kristano serĉanta vivi laŭ Dia volo, (do vivi feliĉe), same tute praktike serĉas la vivpartneron ĉe Dio kaj ili kune vivas kun Dio. Por ĉiu kristano estas la edzeco same sankta kaj same praktika afero.

Kaj tute mi ne ŝatas elkalkuladon de sakramentoj. Pri la speciala pastreco oni en la Nova Testamento ne parolas. La romkatolika pastreco enhavas servon de Dia vorto kaj de eŭkaristio (t. e. servo dum la sankta meso), kaj ensorbis diversajn servojn en la eklezio (apostola, profeta, paŝtista, eduka, evangeliista). Sed en la tutmonda (kat-holos) Krista eklezio tiuj ĉi servoj ekzistas unuope ĉe diversaj servistoj.

Kontraŭe en la Roma eklezio oni metafore parolas pri oka sakramento, pri la eklezio. Sed la eklezio, konkreta eĉ tutmonda kunveno, komunumo, estas vere sankta kaj same praktika afero. Ĝi estas produkto de la festeno de (kaj kun) nia Sinjoro. Al la Manĝo ni alvenas unuopuloj, mi kaj vi, de la Manĝo ni foriras vere ni, komunumo. Mi jam komprenas, kial la unuaj kristanoj **ĉiutage, vizitadante unuani-me la templon, kaj dispecigante panon dome, ili prenis sian nutraĵon kun ĝojo kaj uneco de koro, laŭdante Dion kaj havante favoron ĉe la tuta popolo. Kaj la Sinjoro aldonis ĉiutage al la eklezio la savatojn** (Agoj 2:46,47). La komunumo devas aktivi ĉie ajn, ne nur en la preĝejo.

Nia malfeliĉo, laŭ mi, estas jena: Al ĉiuj ni volas montri, ke ni estas same bravaj kiel ili. Tio komenciĝis jam en la unuaj jarcentoj dum la renkontiĝo kun orienta, greka, roma kulturoj. Ni volis kaj volas montri, ke ni kapablas medi-

Ekumena oktobra monاتفino en KCE

Pro teknikaj cirkonstancoj, la Ekumena Semajnfino planita de KCE kaj Sunhejmo por majfino okazos tamen 27-28 okt 01 en Ĉaŭdefono, do en Domo Naville de Kultura Centro Esperantista.

Enkondukos sacerdoto Bernhard EICHKORN, por la katolika flanko, kaj pastoro Adolf BURKHARDT, por la protestanta. Partoprenos laikoj kaj klerikoj de diversaj kristanaj konfesioj, interesataj pri la demando de la unuigo de la kristanaro.

Eksterordinare, la debato okupos la tutan sabatan tagon (matene kaj posttagmeze), dum la mateno de dimanĉo estos dediĉita al Diservo.

La partoprenkotizo restas la kutima.

Informas: KCE, CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds,
<kce.esperanto@bluewin.ch>,
tel/fakso (41)32-9267407.

Heroldo komunikas n-ro 102



ti kiel Oriento, filozofii eĉ pri Diaj aferoj kiel Grekoj, unuigi mondon kiel antikva Romo. Tiel ni volis kapti ĉiujn, sed male ĉiuj kaptis nin. Ne sufiĉis, ne sufiĉas al ni tio plej bela kaj efika: simpla preĝa interparolo kaj praktika vivo kun nia Dia Patro, kun Mesio Jesuo nia Majstro, en la Sankta Spirito. Do, Krist-ana praktiko.

— Dio benu vin!

Václav POSPÍŠIL

Ĉu ŝtono aŭ sukeraĵo en la nesto de ekumenismo?

Mi ĵus revenas de legado de aĉega libro, tradukita al la itala el la germana. Aĉega pro ĝia malmulta historia kompetento, laŭ teologo Hans KÜNG, kaj pro ĝia konvinkiga forto kontraŭ-kristana, laŭ mia sufera konstato. Temas pri la libro „*Krima historio de kristanismo*” laŭ la titolo itala, de Karlheinz DESCHNER.

Temas pri libro falsa sed vera, antaŭkristana sed tuta kristana! Jen la ekspliko: La aŭtoro intencas pruvi ke kristanismo estas la vera fonto de ĉiuj malindaĵoj. Sed li ne scias ke tion jam diris kaj skribis kaj proklamis cent mil centmil-fojojn kristanoj. Ĉu vi ne kredas tion? Ĉu tio gapigas viajn sensojn?

Legu tion kion pensis diris skribis pensigis, dum tri jarcentoj, protestantoj rilate katolikojn, kaj katolikoj rilate protestantojn, aŭ kion anglikanoj kontraŭ hispanaj katolikoj kaj inverse. Aŭ kion same faris laŭ mil jaroj teologoj kaj eklezi-regantaj ortodoksuloj kontraŭ katolikoj kaj inverse.

Kaj ĉiuj kun granda karitato!

Karlheinz DESCHNER kun siaj kunlaborantoj diras nenion novan: li, por subteni siajn kalumniajn tezojn, ne ekspluatis komplete la fontojn.

Ĉu ŝtono aŭ sukeraĵo por ni ekumenismemaj?

Armando ZECCHIN kun amikoj.

El la listo de IKUE

UEA eldonis kiel n-ro 46 en sia anglalingva serio „*Esperanto Documents*” 22-paĝan studon de Claude PIRON, „*Linguistic communication: A comparative field study*” (Lingva komunikado: kompara praktika studo).

La studo de PIRON temas pri kvar diversaj sistemoj de lingva komunikado en internaciaj organizaĵoj: tiu de Unuiĝintaj Nacioj k. a. organizaĵoj kun kelkaj laborlingvoj; tiu de multnaciaj kompanioj uzantaj unu nacian lingvon, plej ofte anglan; tiu de Eŭropa Unio uzanta la oficialajn lingvojn de ĉiuj membroj; kaj tiu de organizaĵoj uzantaj nur Esperanton. Ĉiuj sistemoj estas komparataj laŭ 12 kriterioj, kiel lernodaŭro, necesaj antaŭinvestoj, ne-egaleco kaj diskriminacio, kostoj de kunsidoj kaj dokumentado, perdo kaj distordiĝo de informoj, ktp.

Ĉe ĉiu kriterio la sistemoj ricevas poentojn de malavantaĝeco: 10 kaze de

tre serioza malavantaĝo, okaze de ne-ekzisto de malavantaĝo. Sekve, se iu sistemo estus totale malavantaĝa, ĝia poentosumo estus 120, dum nulo indikus ĉiurilate idealan sistemon. Kiel la plej malavantaĝa eliris el la studo la UN-sistemo (76 poentoj) kaj kiel la plej avantaĝa la Esperanto-sistemo (5). La EU-sistemo taksigis je 65 poentoj kaj tiu de multnaciaj kompanioj je 39.

La ege interesa studo de Piron estas utila legaĵo por ĉiu, kiu interesiĝas pri la problemaro de internacia lingva komunikado.

La kajero kostas € 2,10 (plus imposto en EU kaj afranko). Por mendo de minimume 3 ekz. la libroservo de UEA donas rabaton de 1/3.

CO de UEA

Interredaktore

GAZETARAJ KOMUNIKOJ DE UEA

N-ro 114 (2001-02-14)

LA ĈEFVERKO DE GOGOL EN LA SERIO „ORIENTO-OKCIDENTO”

Nikolaj GOGOL (1809-1852) estas konata en Esperantujo dank' al La Zamenhofa traduko de „*La revizoro*”, eldonita en 1907. Tamen la ĉefa verko de GOGOL estas ne „*La revizoro*” sed „*Malvivaj animoj*”. Finfine ankaŭ „*Malvivaj animoj*” aperis en Esperanto per la traduko de Vladimir VYĈEGĴANIN. „*Sezonoj*” (Jekaterinburg, Ruslando) eldonis ĝin en februaro 2001 kiel la 32an volumon

de la libroserio „*Oriento-Okcidento*”.

GOGOL laboris pri „*Malvivaj animoj*” dum pli ol dek jaroj, sed li ne sukcesis fini ĝin. Sed jam la unua volumo fariĝis klasikaĵo, unu el la plej fierindaj verkoj de la rusa literaturo. Jam dum la vivo de la aŭtoro la kritika literaturo pri „*Malvivaj animoj*” multoble superis la amplekson de la libro mem. La nomoj de Ĉiĉi-

La Reĝo, la saĝulo kaj la burleskulo

RECENZO

Ĉiu el ni scias kiel la fakto, ke en nia mondo ekzistas diversaj religioj, ĝenerale kondukas al dividiteco, kontrastoj kaj konfliktoj. Nescio kaj antaŭjuĝoj ĉiterene ofte ludas gravan rolon. Al mi ŝajnas gratulinda evoluo, ke en pluraj lokoj estiĝas grupoj da homoj, kiuj kune — legante kaj interparolante — informiĝas pri la grandaj religioj de la mondo. Des pli necesaj estas tiuj iniciatoj tie, kie la socio estas miksreligia; mi opinias ĝin bona afero, ke civitanoj inter si havas scion pri tio, kio plej funde tuŝas kaj inspiras.

Volonte mi volas atentigi la leganton de *Dia Regno* pri rimarkinda, samtempe simpla kaj profunda, libro kiu aperis sub la titolo „*La reĝo, la saĝulo*”

kov kaj de aliaj protagonistoj jam delonge metaforiĝis, kaj citaĵoj el „*Malvivaj animoj*” iĝis parto de ĉiutaga vivo en Ruslando.

La 224-paĝa libro estas fortike bindita kaj provizita de bela kromkovrilo. Ĝi estas mendebla kontraŭ 18 euroj ĉe UEA, FEL kaj aliaj gravaj libroservoj, ankaŭ rekte ĉe la eldonejo poŝte.

Halina GORECKA

Adreso: RU-620014, Jekaterinburg-14, p. k. 162, Ruslando
Telefona: (3432) 281711
Retadreso: <sezonoj@mail.ru>
<http://www.sezonoj.itgo.com>

kaj la burleskulo” kaj kiun verkis Sha-fique KESHAVJEE.

La aŭtoro estas protestanta pastoro, kiu naskiĝis en Kenjo kaj originas el Hinda islama familio. Li animzorgas en Svisio kaj rekte rolas en la dialogo inter la grandaj mondreligioj. En sia libro li pritraktas budhismon, hinduismon, islamon, judismon kaj kristanismon. Ilin antaŭas, tamen, la malo de religio, t.e. ateismo.

La libro rakontas pri reĝo, kiu havas zorgojn pro tio, ke liaj subuloj ne konfesas religion kaj ke lia lando, sekve, devas savi sin sen pli profundaj vivo-fontoj. Ŝajnas al li grave, ke tiu situacio nepre ŝanĝiĝu! Sed kiun religion li kiel reĝo elektu?

Por solvi tiun demandon, li decidas organizi turniron, kiu iom similas al, mi diru, Olimpikaj Ludoj por la mondreligioj. Lin asistas du membroj de lia kortegano, unu saĝa, la alia burleska. Li sendas invitojn al ĉiuj grandaj mondreligioj, petante ke ili delegu aŭtoritatajn reprezentantojn. Daŭre de la turniro unu post la alia ricevas la parolon. Sekvas reciprokaĵoj diskutoj. Ankaŭ la publiko povas ĉiel reagi. De tempo al tempo ni povas iomete rigard-ekskursi en la senvorta pensomondo de la diversaj spiritaĵoj matadoroj.

Tiele rezonante kaj verkante la aŭtoro sukcesas en fajretanta maniero tagordumi la mondreligiojn. Kompreneble, ĉiu reprezentanto klopodas emfazi la plej profundan intencon de sia kredo aŭ vivkoncepto. Sed samtempe plene leviĝas ĉiuj kritikaj kontraŭargu-

mentoj. La aktualecon neniu forkuras. Tiel, ekzemple, surtabliĝas temoj kiel subpremado de la virino, la cirkumcidigo de knabinoj, la vira bildo de Dio, la politikaj tensioj en la Mez-Oriento, la kastaro en Hindio, ktp.

La verkisto povis ĉerpi el riĉa fonto de spertoj kun la interreligia dialogo. Li ne klopodas glatigi la diferencojn inter la mondreligioj. Ĝuste pere de la dialogo ĉiu povas malkovri la unikecon de la diversaj kredokonvinkoj. Pli ol unufoje li trafte indikas, en kio religioj inter si malsamas. Ekzemple, kiam li rimarkigas la judan reprezentanton David HALEVI:

„Resume, mi havas la impreson ke la hinduoj kaj budhanoj preferas sidadon, taŭgan sintenon por mediti kaj interniĝi; ke la islamanoj konsideras valora la transiron de la staranta al la surgenua sinteno kiel signon de submetiĝo al Alaho; ke la kristanoj precipe emfazas la rektiĝadon de kuŝanta persono kiel simbolo de la transiro de morto al releviĝo. La specifa mesaĝo, konfidita al la judoj, jenas: irado, eliro el Egiptio al la Promesita Lando, de sklaveco al libereco”.

Klare, tamen, oni povas legi, kiel kaj kiom la religioj en siaj fundamentaj intencoj inter si harmonias. La saĝulo tion vortigas kiel la duoblan sperton de malteni kaj interligi. Inter ili ekzistas dinamiko. Ke tiu dinamiko perdiĝas, ĉio finiĝos malbone. Tiel li konstatas: „Nenio estas tiel danĝera kiel rigidiĝinta ligilo”.

Al tiuj, kiuj volas komune, en ekumena aŭ prefere interreligia grupo, pri diskuti valoran temon, mi varme rekomendas ĉi tiun libron!

Jacques TUINDER
oktobro 2000

Du fragantoj el la libro

Aŭskultu jenan parabolon.

En iu tago samurajo demandis al la Zenmajstro Hakujo: „Ĉu ekzistas la infero? Ĉu la paradizo? Se jes, kie troviĝas iliaj pordegoj?”

La samurajo havis simplan spiriton. Li ne emis cerbumi pri filozofiaj aferoj; li nur deziris ekscii kiel atingi la ĉielon kaj eviti la inferon.

Hakujo respondis al li lianivele: „Kiu vi estas?” *li demandis.*

„Mi estas samurajo”, *diris la viro.*
En Japanio samurajo estas perfekta militisto, kiu hezitas eĉ ne sekundon por, se necese, doni sian vivon.

(...)

„Vi, ĉu vi — samurajo?”, *mokis Hakujo,* „vi pli similas al kompatinda sentaŭgulo”.

La samurajo, ofendita en sia sento de propra valoro, forgesis la kialon de sia veno kaj tiris sian glavon.

Hakujo ridetis dirante:
„Rigardu, ĝuste nune kaj jene — pordo! La glavo, la kolero, la vanteco kaj la memo estas la inferaj pordoj”.

La samurajo komprenis la lecionon kaj eningis la glavon.

„Kaj tio estas la alia pordo, la pordo kondukanta al la paradizo”, *klarigis Hakujo.*

Pri iu Robinson oni rakontas jene: li estis judo kiu alnaĝis sur forlasitan insulon kaj tie starigis diversajn konstruaĵojn.

Iun tagon malproksime aperas ŝipo, kiu fine antaŭ la bordo ankras. Kiam la kapitano vizitas la konstruaĵojn de la unuopulo, li miras pri lia laboro.

„Jen mia domo, jen mia sinagogo, la domo kien mi iras por preĝi”.

Rezulto 2000 kaj buĝetoj 2000, 2001 kaj 2002

| | NLG | NLG | NLG | NLG | EUR |
|---------------------------|---------------|---------------|---------------|---------------|--------------|
| | Buĝeto 2000 | Rezulto 2000 | Buĝeto 2001 | Buĝeto 2002 | Buĝeto 2002 |
| Elspezoj | | | | | |
| Presisto | 8.250 | 8.545 | 9.000 | 9.000 | 4.084 |
| Imposto VAT | | 0 | 1.320 | 1.320 | 599 |
| Perantoj | 20 | 23 | 20 | 20 | 9 |
| Revukostoj | 8.270 | 8.568 | 10.340 | 10.340 | 4.692 |
| Komputilo | 250 | 250 | 125 | 0 | 0 |
| Faksilo | 104 | 104 | 104 | 0 | 0 |
| Amortizoj | 354 | 354 | 229 | 0 | 0 |
| Prezidanto | 100 | 0 | 100 | 100 | 45 |
| Sekretario | 150 | 115 | 130 | 130 | 59 |
| Redaktoro | 200 | 200 | 200 | 250 | 113 |
| Kasisto/Matrikulisto | 350 | 188 | 200 | 200 | 91 |
| Estrarbulteno | 300 | 21 | 80 | 80 | 36 |
| Estrarkostoj | 1.150 | 524 | 710 | 760 | 344 |
| UEA-kotizo | 110 | 106 | 110 | 115 | 52 |
| Ĉambro de Komerco | 70 | 71 | 75 | 75 | 34 |
| Kaskontrolo | 60 | 26 | 60 | 60 | 27 |
| Bankkostoj | 30 | 59 | 50 | 50 | 23 |
| Merituloj | 50 | 95 | 50 | 50 | 23 |
| UK Lukostoj | 200 | 110 | 150 | 150 | 68 |
| Generalaj kostoj | 520 | 467 | 495 | 500 | 227 |
| Varbado (Inf./varba kaso) | 50 | 25 (60) | 50 | 50 | 23 |
| Elspezoj entute | 10.344 | 9.938 | 11.824 | 11.650 | 5.287 |
| Enspezoj | | | | | |
| Kotizoj/Abonoj | 7.500 | 6.903 | 6.800 | 9.000 | 4.084 |
| Kotizpagdiferencoj | - 20 | 55 | 20 | 20 | 9 |
| Rabatoj de Perantoj | - 50 | - 37 | - 50 | - 50 | 23 |
| Profito de kongreso | 0 | 412 | 0 | 0 | 0 |
| Librovendado | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 |
| Kotizoj entute | 7.430 | 7.333 | 6.770 | 8.970 | 4.116 |
| Rentumoj | 2.300 | 1.992 | 2.300 | 2.000 | 908 |
| Adopta Kaso | 1.900 | 2.721 | 2.000 | 2.000 | 908 |
| Enspezoj entute | 11.630 | 12.046 | 11.070 | 12.970 | 5.932 |
| Saldoj | 1.286 | 2.108 | -754 | 1.320 | 599 |

KLARIGOJ KAJ RIMARKOJ PRI LA BILANCO 2000-12-31

Aktivoj

- PB-Rentumatesto (4%) fiksdato ĝis 10.12.2002
E-Misio, pruntaĵo (4%) al K. Leja, repago ĝis 2004
Pavel Polnický, EB: Li ricevis monon por sendado de Estrara Bulteno
Kuranta konto K.Leja: Tiel alta, ĉar ni antaŭpagis DR por 2001 fine de 2000 laŭ dujara kontrakto.
Stokoj: Sanktaj Biblioĵ (19), Novaj Testamentoĵ (broŝ. 79), Novaj Testamentoĵ (bind. 49), Evangelioĵ laŭ Johano (272)
E-Misio kasedoj: Dimanĉa koncerto (73)
La vendado de libroĵ kaj kasedoj stagnas. **Necesas inventaro kaj ĉiuj vendantoĵ estas petataĵ kontakti la kasiston.**
Transitaĵo: 550 NLG rentumo el Kapitaalrekening 2000

Pasivoj

- E-Misio: El la Fonduso ni pagis al Bernhard Eichkorn (IKUE) por defecitoĵ el la Junulara Esperanto Tendaro (JET, estas ekumena servo al gejunuloĵ), 1997 en Unterkirnach, DE; 1998 en Taizé, FR; 1999 en Gliwice, PL; 2000 en Taizé, FR (subvencio) entute 2600 EUR = 5.729,65 NLG. Decido de la jarkunveno estis pagi la defecitoĵn de JET ĝis 1998 (1000 EUR) kaj la duono de la kongresdefecito de Graz 1997 kaj Gliwice 1999 (1.750 EUR), entute 2.750 EUR. La finkalkulo de la EEK Gliwice montris gajnon, sed preskaŭ samaltan defeciton de JET. La fakturo de Bernhard Eichkorn estis 2.118,19 EUR. KELI aldonis 481,81 EUR por JET Taizé 2000 kaj elspezis 2.600 EUR. La plimulton de la defecitoĵ pagis IKUE, konsiderinte la partoprenintoĵn laŭ la konfesioĵ.
E-Misio en Litovio post transporto de materialoj el Pollando ankoraŭ ne efektive funkcias.
Plii elspezo estis 22,53 NLG por afranko. Enspezioĵ rentumaj estis 571,69 NLG kaj 143,10 NLG el la kongresa profito en Ĉeĥio.
Helpa Kaso: Kreskis pere nuligo de la Svisa Kaso. Ni subtenis du membroĵn partopreni la KELI-kongreson. (3 hungarinoĵ ricevis subtenon el la Hungara Kaso).
Kreditoroĵ: Brita kaso (267,76 NLG) disponas Tom Neil,
Hungara kaso (1.537,08 NLG) disponas Iren Bagi
Ĉeĥa Kaso (30,04 NLG) disponas Pavel Polnický
Svisa kaso (4.161,13 NLG) estas transkontigita al la Helpa Kaso (post preparolo kun Elsbeth Walder).
Transitaĵoĵ: Antaŭricevitaj kotizoj 169,71 NLG (2001); sekretariaĵ kostoj 59,50 NLG, redaktoraĵ kostoj 200,54 NLG.

KLARIGOJ PRI LA REZULTO 2000 KAJ LA BUĜETO 2001/2002

Saldo 2000: Pozitiva saldo estas rezulto de redukto al nur 6 numeroĵ de DR po jaro, duonigo de la estraraj kostoj (interreto) kaj altaj donacoĵ al Adopta Kaso.

Kotizoj pagendaj de...

| | | | |
|--------------------------|------------------|-----------------------|----------------|
| Individuaj membroĵ | 206 (222) | Rektaj abonantoĵ | 23 (13) |
| Individuaj familianoĵ | 21 (21) | <u>IKUE-abonantoĵ</u> | <u>14 (15)</u> |
| Subtenantoĵ | 3 (3) | | 37 (28) |
| Dumvivaj membroĵ | 29 (30) | | |
| <u>Adoptitaj membroĵ</u> | <u>169 (178)</u> | (... antaŭa jaro) | |
| | 428 (454) | | |

Nia vera financa problemo estas la malkreskanta membraro, grandparte pro maljuneco. Mortis en 2000 kvin membroĵ kaj sufiĉe multaj malaliĝis aŭ ne pagis. Tamen ni estas vivanta, ni ja gajnis ankaŭ 16 novajn membroĵn/abonantoĵn. Ĉiuj estas petataĵ subteni ankaŭ estonte la Adoptan Kason, el kiu ni pagas la DIA REGNON por finance malfortaj membroĵ, speciale en la ekssocialismaj landoj. Ili estas petataĵ kontribui „laŭforte” (kotizo laŭ interkonsento kun la landa peranto).

Adopta Kaso: Koregan dankon al ĉiuj donacintoĵ kaj donacontoĵ!

Saldo 2001: Estos negativa pro nova pola imposto VAT (220 NLG po numero DR). Ni serĉas vojon eviti tion.

Saldo 2002: Ni havos kotizaltigon kaj pro tio pozitivan saldon. Pro la VAT-imposto reduktiĝos iomete niaĵ esperoĵ estonte havi pli da eblecoĵ agi subtenante, misiante kaj eldonante (ekz. JET, BIBLIO, ADORU).

Heilbronn, 2001-04-05
Siegfried Krüger, kasisto

[antaŭ la presado de ĉi-dokumento pola parlamento decidis nuligi 22% VAT-imposton ĝis la fino de la jaro 2003 – rim. de K.L.]

Financa Raporto de KELI 2000 (ĉiuj sumoj en NLG)

1 NLG = 0,45378 EUR

| Bilancoj fine de la jaroj | | 1999 | 2000 |
|---------------------------|-----------------------------|------------------|------------------|
| Aktivoj | PB-Giro (PB = Postbank NL) | 7.018,80 | 1.513,81 |
| | PB-Kapitaalkontoj (3,25%) | 20.815,74 | 24.888,60 |
| | PB-Rentumatesto (4%) | 40.000,00 | 40.000,00 |
| | UEA-konto kelk-p | 2.685,49 | 444,44 |
| | Kasista kaso | 0,00 | 105,23 |
| | Monrimedoj | 70.520,55 | 66.952,08 |
| | E-Misio, 4% prunted. K.Leja | 3.467,66 | 2.768,92 |
| | Kuranta konto K. Leja | 8.536,81 | 8.723,86 |
| | Pavel Polnický, EB | 182,78 | 162,14 |
| | Komputilo | 375,00 | 125,00 |
| | Faksilo | 208,00 | 104,00 |
| | | 12.770,25 | 11.883,92 |
| | Stokoj (libroj) | 844,58 | 844,58 |
| | E-Misio, Kasedoj D.K. | 466,31 | 466,31 |
| | | 1.310,89 | 1.310,89 |
| | Transitaĵoj | 355,00 | 550,00 |
| | Aktivoj sume | 84.956,69 | 80.696,89 |
| Pasivoj | Kapitalo | 9.048,71 | 8.578,90 |
| | Saldoj negativa/pozitiva | - 469,81 | 2.107,70 |
| | Kapitalo entute | 8.578,90 | 10.686,60 |
| | Dumvivaj membroj | 5.511,13 | 5.511,13 |
| | E-Misio | 17.774,36 | 12.786,97 |
| | Helpa Kaso | 3.243,23 | 7.070,84 |
| | Junulara helpa Kaso | 743,65 | 743,65 |
| | Kongr. rezerva Kaso | 4.152,69 | 4.125,08 |
| | Literatura/Himnara Kaso | 27.370,51 | 27.387,41 |
| | Informada/Varbada Kaso | 180,58 | 120,58 |
| | Legaco C.P.W. | 5.000,00 | 5.000,00 |
| | Legaco E.t.O.-W. | 5.000,00 | 5.000,00 |
| | Fondusoj entute | 68.976,15 | 67.745,66 |
| | Kreditoroj | 6.864,09 | 1.834,88 |
| | Transitaĵoj | 537,55 | 429,75 |
| | | 7.401,64 | 2.264,63 |
| | Pasivoj sume | 84.956,69 | 80.696,89 |

BONVENON EN KROATION EN JULIO 2001 AL LA 86-A UNIVERSALA KAJ 1-A HILELISTA E-KONGRESOJ

Kroatio estas mez-eŭropa mediteranea lando, okupanta areon de 56 600 km².

Post kiam en la 11-a jarcento reĝlando Kroatio perdis sian plenan ŝtatan sendependecon, ĝi dum jarcentoj estis politike pli-malpli subordigita al la pli potencaj najbaraj ŝtatoj – Aŭstrio, Hungario, Serbio (iuj partoj de Kroatio troviĝis sub la regado de Bizanco, Osmana imperio, Italio). En 1991 Kroatia parlamento proklamis (denovan) plenan politikan sendependecon de la lando, kiu en 1991–1992 estis ankaŭ internacie agnoskita. Bedaŭrinde, sendependiĝo de Kroatio dum la disiĝo de la plimulto da iamaj federaciaj respublikoj de Jugoslavio, provokis militan kontraŭstaron flanke de Serbio kaj rezultis per dekmiloj da perditaj homaj vivoj kaj per detruo de multaj vilaĝoj kaj eĉ de tutaj urboj. Kroatio ankoraŭ sanigas siajn vundojn.

Konsiderante la riĉeventan histori-



La kapitano plenas de admirado.

„Kaj tio, kio estas tio?“, li demandas, montrante al impresplena konstruaĵo.

„Tie estas dua sinagogo“.

„Sed vi estas freneza! Kial vi konstruis du?“ „Tiu alia estas tute diferenca. Ĝi estas la sinagogo, kiun mi ne frekventas!“

La publiko estis ravita, ĉar prezentigis okazo por ridi.

on kaj esceptan geografian heterogenecon de Kroatio, ne estas mirinde, ke ĝi estas tre alloga ankaŭ por la modernaj „pacaj konkerantoj“ – la turistoj. Kroation jare vizitas pli da turistoj ol la lando havas loĝantojn. Vere, estas ĉi tie kaj belega mediteranea ĉemara regiono (kun centoj da insuloj kaj insuletoj), kaj parto de ampleksega Panonia ebenaĵo (kun vastaj kampoj de tritiko), kaj – inter ili – montara regiono (kun puregaj montaraj lagoj, kavernoj, densegaj arbaroj). Ĉiu el tiuj tri specifaj regionoj havas ankaŭ sian specifan klimaton. Kaj ĉion ĉi oni povas sperti ene de la cirklo kun ne pli ol 200-kilometra radiuso!

Negranda laŭ okupata areo, Kroatio havas eĉ 7 naciajn parkojn – 4 ĉe la Adriatika marbordo (arkipelago Kornati, parto de la insulo Mljet, arkipelago Brijuni kaj rivero Krka), kaj 3 en la montara regiono (Risnjak, Paklenica kaj mondkonataj Plitvicaj lagoj). La arkipelago Kornati estas la plej vasta arkipelago en la regiono de Mediteraneo. Ĝia ter- kaj akvo-areo ampleksas 224 km², enhavante 101 insuleton kaj estante ege alloga por jaktemuloj. Sudadriatika insulo Mljet abundas per mediteraneaj arbaroj. Sur la nordadriatika arkipelago Brijuni (36 km²), konsistanta el 2 grandaj insuloj kaj 12 insuletoj, vivas iuj ege raraj plantokaj besto-specioj, kaj tie troviĝas restaĵoj el la antikveco, de la romia kaj bizanca epokoj. Rivero Krka, malsupreniĝante al la Adriatika maro, kreas multajn belegajn lagojn kaj akvofalojn.

Montaro Risnjak, situanta ne malproksime de la maro, je alteco 1528 m, allogas per siaj densegaj arbaroj, kaj montaro Paklenica — per siaj montfandoj, profundaj ĝis preskaŭ 400 m, kaj pro sia rarega blankakapa aglo. Plitvicajn lagojn (16 lagojn kun 92 akvofaloj) — pro ilia unika en la mondo beleco — Unesko envicigis en la Liston de mondaj naturbelajaĵoj.

Kroatio abundas per etaj pitoreskaj vilaĝoj kaj per belegaj urboj kun multaj kulturhistoriaj vidindaĵoj. Certe la plej alloga el kroataj urboj estas — Dubrovnik, estinta de 1358 ĝis 1808 sendependa urbo-respubliko. Nun tiu perlo de suda Adriatiko, kun sia unika riĉenhava kultur-historio, kaj estanta sub la alta protektado de Unesko, prezentas unikan urbo-muzeon. Sub la protektado de Unesko estas ankaŭ marborda urbo Split, konata precipe pro sia Palaco de romia imperiestro Diokleciano (el 4-a jarcento p. K.). Tamen, sur la kroata Adriatika marbordo estas ankaŭ dekoj da aliaj urboj kaj urbetoj kun ne malpli riĉa kultur-historio, ekde antikvaj tempoj: ekz. Poreĉ (kun sia baziliko el 6-a jarcento), Pula (kun sia romia amfiteatro el 1-a jarcento), Zadar (kun siaj belegaj malnovaj preĝejoj, precipe kun unika rondonda preĝejo de Sankta Donat el 9-a jarcento). En la urbo Hvar, sur la samnoma insulo, troviĝas unu el la plej malnovaj teatroj en Eŭropo (konstruita en 1612). Ankaŭ Zagreb — la kroata ĉefurbo, situanta en la nordokcidenta parto de la lando, havas pli ol 900-jaran historion. Nun ĝi estas moderna urbego, kun ĉirkaŭ 1 miliono da loĝantoj, centro de politika, ekonomia kaj kultura vivo de la lando.

En Kroatio oni povas kontentigi la

plej diversspecajn gustojn kaj interesojn. Oni povas sunbruniĝi ĉe la Adriatika marbordo, naĝi en kaj navigi sur la maro, skii en la proksime al la maro situanta montaro, bani sin en multnombraj banejoj (el kiuj multaj estas sanigaj) en la kontinenta parto de la lando, ĉasi en la vastaj ebenaĵoj, fiŝkapti en puraj riveroj, ĝui multnombrajn kulturhistoriajn vidindaĵojn. En la lando oni povas paroli en Esperanto kun kelkcento da kroataj esperantistoj, kontaktante ilin private aŭ ĉeestante iliajn klubajn kunvenojn kaj aranĝojn. Ja Esperanto-movado en Kroatio komencis evolui ankoraŭ dum la vivo de d-ro L. L. ZAMENHOF!

Mato SPEKULJAK
(El „Hilelisto” No. 13)

Reago

Kara Philippe!

Jes, via mesaĝo bonorde alvenis al mi. Mi ja ricevis vian ankaŭ antaŭan leteron pri la nova encikliko. Nun mi nur mallonge reagis: ne timu! Ni ĉiuj estas en la sama ununura eklezio de Kristo.

Ankaŭ en unu familio estas diversaj personoj, ili havas komunajn trajtojn sed tamen estas ankaŭ diferencoj. Kiam Paŭlo parolis pri la diversaj membroj de la korpo, ke ili tamen faras unu mistikan korpon de Kristo, mi pensas, ke tio rilatas ankaŭ al la diversaj komunumoj (eklezioj). Do, ni laboru paŝo post paŝo por nia ekumeno.

Via frate en Kristo
Ludoviko KÓBOR

Manpleno da novaj elektronikaj libroj

eLibrejo, la interreta „libroservo” kun elektronikaj libroj, proponas manplendon da novaj titoloj. Plej surpriza estas „*Pastaĵo — konsideroj kaj historio*” de Marco PICASSO. La libreto estas originale verkita en esperanto kaj aperas unue ĉi tie kiel eLibro. Ĝi ne estas recepto-libro, sed pritraktas la temon — spagetoj, makaronioj, k. s. — tute ĝenerale, donante utilajn informojn pri historio, san-avantaĝoj kaj uzado. La aŭtoro bonvenigas sinpropojn traduki la libreton en naciajn lingvojn.

Du novaj eLibroj turnas sin al infanoj. Ili estas „*Emilo en Smolando*” de la sveda verkistino Astrid LINDGREN (ankaŭ aĉetebla kiel presita libro) kaj malmulte konata libreto de Franjo MODRIJAN, „*Fabeloj*”, originale verkita en esperanto. Estas antaŭvidita la elektronika eldono de du pliaj libroj de Astrid LINDGREN: „*Fratoj Leonkoro*” en marto kaj la plena versio de „*Ronjo, rabista filino*” iam dum la printempaj monatoj.


Dum la UK de Dreseno en 1908 estis ludata dramo de la sveda verkisto August STRINDBERG, „*Fraŭlino Julie*”. Tiu dramo — aŭ „naturalista tragedio”, kiel la aŭtoro subtitolis ĝin — estas denove havebla, en iom modernigita lingvo. Ĝi estas unu el la ĉefaj verkoj de STRINDBERG kaj daŭre ludata, ankaŭ ekster Svedio.

Pluraj libroj turnas sin al amantoj de interesaj legaĵoj. Pri amo temas la klasika germana „*Imenlago*” de Theodor STORM, dum tri titoloj apartenas al la fako scienc-fikcio: „*Doktoro Jekyll kaj sinjoro Hyde*” de R. L. STEVENSON,

kaj „*La tempo-maŝino*” kaj „*Lando de blinduloj*” de H. G. WELLS. En ĉiuj kazoj temas pri modernigitaj malnovaj tradukoj.

eLibrejo troveblas ĉe <http://esperanto.nu/eLibrejo>. La libroj estas senpage elŝuteblaj.

Franko LUIN
<franko@omnibus.se>
Interredaktore



TEJO lanĉis retrevuon

En februaro ekfunkciis TEJO-aktuale, semajna reta revuo de TEJO. Oni povas ekricevi ĝin senpage per mesaĝo al <majordomo@esperanto.org> kun la enhavo „subscribe tejo-aktuale”. Eblas aboni ĝin ankaŭ en ĝia retpaĝo: <<http://www.esperanto.org/tejo/publikajxoj/aktuale/pagxo.html>>

TEJO-aktuale publikigas nur mallongajn artikolojn kaj provizas adresojn de retpaĝoj aŭ kontaktendaj personoj por pliaj materialoj. Unu fojon semajne, ĉiun lundon, ĝi dissendas kelkajn elektitajn novaĵojn, interesajn por la junulara Esperanto-movado.

Se vi volas kontribui al la revuo per novaĵoj, bv. direkti ilin al <tejo-aktuale-red@esperanto.org>.

Interredaktore
GAZETARAJ KOMUNIKOJ DE UEA
N-ro 118 (2001-03-26)

La Eŭropa Jaro de Lingvoj estas la temo de la unua Kontakto en la jaro 2001.

Anna RITAMÄKI, Finnlando, priskribas en informplena artikolo kiel naskiĝis la Lingvojaro, kion ĝi celas kaj kion ĉiu el ni povas fari por ĝi. La Eŭropa Jaro de Lingvoj, laŭ RITAMÄKI kiu estas komisiito de EEU pri ĝi, estas grava por esperantistoj, ĉar ĝi emfazas la temon lingvopolitiko, kaj atentigas pri temoj, kiuj interesas esperantistojn jam de pli ol jarcento. La numero havas ankaŭ kalendaron de la Lingvojaro kaj informojn pri retpaĝoj kaj adresoj por pli da informoj pri ĝi kaj kiel partopreni en ĝi.

La Lingvojaro videblas ankaŭ en aliaj artikoloj: Sonja PETROVIĆ, Jugoslavio, organizanto de la TEJO-seminario „Lingva Ĉielarko”, intervjuiĝas de Aleksandr BLINOV, Rusio. OSHÓ-DAVIES Olúwabùnmi, Niĝerio, kaj Alberto GARCIA FUMERO, Kubo, kontribuas al la ekstereŭropa dimensio kaj diskutas proverbojn en siaj respektivaj landoj. Sergej KALEGIN, Rusio, kaj Piotr SZYMECZKO, Pollando, argumentas por la vivanta latino.

1161 ADRESOJ EN PASPORTA SERVO

La ĉi-jara adresaro de la plej fama servo de TEJO, Pasporta Servo, nombras 1161 gastigantojn 80 landoj. En 2000 la reto de gastigantoj konsistis el 1075 adresoj en 76 landoj. En du jaroj la reto kreskis preskaŭ je unu kvarono, ĉar en 1999 ĝi ampleksis 945 adresojn.

Francio okupis la unuan lokon kun

Ĉeestas ankaŭ la socia dimensio: la Mondan Socian Forumon en Brazilo partoprenis Miguel BOEIRA VIANNA. Simon LASZLO, Rumanio, klarigas kial li fariĝos anarkiisto post vivado en tiel nomata demokratio. En Bumerango, Ulrich MATTHIAS kaj David FERGUSON diskutas pri la Ĉarto de Fundamentaj Rajtoj, kaj Saeed FARANI, Pakistano, pensigas pri la rolo de Esperanto en la triamondaj landoj.

Ĉe la distra flanko Nasredin, fama heroo de popolaj rakontoj de Balkanio ĝis Proksimoriento, aventuras. Ne mankas enigmo, recenzoj k.a. tradiciaj rubrikoj, nek facillingvaj artikoloj. *Kontakto* celas larĝan publikon, de gejunuloj ĝis komencantoj, kaj tial ĝia enhavo estas tre varia — ĉiu trovas ion por si. Konatiĝu ankaŭ vi kun *Kontakto!*

Kontakto aperas 6-foje jare. Jara abono kostas €18 (por landoj en la B-tarifo €9). Oni povas aboni ĝin pere de la kotizperanto de UEA en sia lando aŭ pagante rekte al UEA.

103 gastigantoj kaj Germanio la duan kun 94. Rusio, kie en 2000 estis plej multe da adresoj, havas 87 gastigantojn. Aliaj landoj kun multaj adresoj por vojaĝantaj esperantistoj estas Pollando (63), Britio (52), Usono (49), Ukrainio (48), Brazilo (46), Japanio (41), Nederlando (36), Hungario (35), kaj Bulgario kaj Irano (po 34).

La angla ĉu? Ne!

Traduko de letero ricevita de la redaktoro de *Ökumenisches Esperanto Forum*.

Estimata sinjoro BURKHARDT,

multajn salutojn sendas al vi Harald SCHMITZ el Pulheim apud Kolonjo.

Mi ŝatus gratuli vin pro la bonega kelkpaĝa artikolo en la lasta *OekEsFo*, aparte pro la interesaj spertoj kun la angla kaj Esperanto.

Ankaŭ mi, kiel gimnazia instruisto de matematiko kaj la angla, amas kaj regas la samajn fremdajn lingvojn kiel vi, kaj mi povas centprocente substreki viajn observojn kaj konkludojn.

La angla nur ŝajne estas simpla lingvo, eble dum la unuaj studmonatoj. Poste oni rimarkas pli kaj pli, kiom malfacila ĝi estas, ĉefe pro la neregulaĵoj kaj la grandega vorttrezoro. Se oni volas uzi la anglan (simile) kiel denaskulo, oni devas interalie regi la t. n. lokaciojn, do ne nur koni la vortojn mem, sed ankaŭ scii, kiuj vortoj kuti-

↪ En la bele presita 198-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj kaj aliaj informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj kun indikoj pri ĉiuj lokoj kun gastigantoj, tiel ke eblas facile plani sian vojaĝon. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo kaj aliaj utilaj adresoj.

Esperantistoj, kiuj membras en la Pasporta Servo, rajtas senpage tranokti ĉe la gastigantoj. Membro de Pasporta Servo estas ĉiu, kiu posedas la adresaron. Gastigantoj ricevas la libron senpage, aliaj povas aĉeti ĝin.

La ideon pri Pasporta Servo, tiam sub la nomo Programo Pasporto, prezentis la argentinano Ruben FELD-

me estas ligeblaj.

Lastatempe mi trovis bonegan libron, per kiu oni povas perfektigi sian regadon de la angla kaj samtempe montri ties komplikecon.

Josef KÖSTER/Paul LIMPER; *Exercises in Collocational English*, Aschendorff-eldonejo, ISBN 3-402-02871-9, ĉ. 25,- DEM.

Paĝo 15 ekzemple donas du listojn kun po 30 adjektivoj kaj substantivoj. Mi dubas, ke multaj fanfaronuloj, kiuj pretekstas „perfekte paroli la anglan” eĉ konas ĉiujn germanajn ekvivalentojn de la 60 vortoj. Ju pli malfacile estas nun trovi/scii la ĝustajn parojn?!?

Mi deziras al vi daŭre sukcesan laboron por Esperanto kaj KELI. Ĉiam mi ĝojas ricevi la cirkuleron kaj legi la novaĵojn el la katolika Esperanto-mondo.

Samideane kaj sincere,

Harald SCHMITZ

P. S. Se vi volas, vi rajtas reprints ĉi tiun retmesaĝon (aŭ parton de ĝi) kiel legantleteron en venonta numero de *OekEsFo*.

MAN GONZALEZ en 1966. La unua adresaro laŭ la nuna sistemo, kun 40 gastigantoj, aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie CASH el Francio. Ambaŭ pioniroj troviĝas inter la gastigantoj ankaŭ en la plej nova eldono. La nuna administranto de la servo estas Derk EDERVEEN el Nederlando.

La adresaro estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA. La prezo estas €10,80 plus afranko (plus imposto de 6% en EU). Ekde 3 ekz. oni ricevas trionan rabaton.

CO de UEA

Interredaktore

GAZETARAJ KOMUNIKOJ DE UEA

N-ro 116 (2001-02-16)

Kadre de la Internacia Jaro de Kulturo de Paco TEJO okazigis seminarion en Varna (1–8 septembro 2000) kun la temo „Balkana junulara agado por kulturo de paco”. Ĵus aperis interesa 60–paĝa raporto pri ĝi. La raporto prilumas multfacete la laboron dum la seminario: prelegojn, laborgrupojn, vesperojn, ekskursojn kaj kontribuojn de partoprenantoj. Ĝi enhavas ankaŭ detalan enkondukon pri organizado de seminarioj.

Inter aliaj temoj oni trovas ampleksajn prezentojn pri Esperantio, Landa Agado, Financoj, Eksteraj Rilatoj,

Amasaranĝoj (ekz. kiel organizi Lingvan Festivalon), Informado kaj Gazetaro. Tiel la raporto estas leginda ne nur por tiuj, kiujn interesas junulara laboro aŭ Balkano, sed ankaŭ por tiuj, kiuj intencas prepari aranĝon aŭ alimaniere aktivi ekz. en Esperanto-organizo.

Al la raporto kontribuis partoprenantoj kaj prelegantoj de la seminario, kaj ĝin kompilis ĝenerala sekretario de TEJO, Vlad'ka CHVATALOVA. Finredaktis ĝin Sabira STÅHLBERG kaj reviziis Aleksandar SHIVAROV. La raporto estas mendebla en la Libroservo de UEA kontraŭ € 6,90.

Sekretaria Jarraporto pri la jaro 2000

Sur la tablo antaŭ mi kuŝas blankaj paperoj, sekciaj komunikiloj, raportetoj, *Dia Regno*. Kun la helpo de tiuj dokumentoj mi provas denove kompili mian jarraporton. Al ĉiuj personoj, kiuj sendis informojn, mi kore dankas. Mi estas konvinkita, ke estis aktivecoj, pri kiu la KELI-anaro ne estas informita. Pluraj el vi certe spertis, ke reciproka informado povas esti instiga. La nova komunikilo, la elektronika poŝto, estas tre utila. La plej multaj estraranoj nun uzas ĝin. Rapidaj reagoj iras de unu persono al eĉ pli da personoj en la sama momento. La nova medio instigas nin kunlabori. Vi ĉiuj estas petataj al kunlaborado kaj serĉado de novaj estraranoj. KELI estas internacia unuigo kiu bezonas internacian estraron kaj kunlaborantojn. En tiu ĉi jaro 2001 mi rememoras, ke mi fariĝis sekretariino antaŭ 20 jaroj dum la Ekumena Kongreso en Dalfsen. Mi neniam povis antaŭvidi, ke tiu sekretaria deĵorado

daŭrigus tiel longe. En la ĉi-jara jarkunveno mi estas lastfoje reelektebla.

Komunikado

Dia Regno estas nia vizaĝo al la ekstera mondo. Ĝi estas grava ligilo inter niaj membroj. Dank' al la multjara redaktora laboro de Philippe COUSSON kaj la zorga kunlaboro de la eldonisto de *Dia Regno*, Kazimierz LEJA, ni estis informitaj pri eventoj en nia ligo kaj ni povis legi interesajn artikolojn. La redaktoro volonte akceptas sciindaĵojn. Via aktiva kunlaborado estas tre necesa. *Dia Regno* aperis 6 fojojn jare en nova, duobla formato.

David FEATHERSTONE prilaboris la *Estraran Bultenon* kaj Geoffrey DOROW postsekvis lin. Ĝi estis bona ligilo inter la dise loĝantaj estraranoj kaj reprezentantoj. Ni parte dissendis ĝin per la elektronika poŝto. La TTT-paĝon de KELI prilaboris Philippe COUSSON.

Diservoj

Mi ne raportas nun pri la ekumena Diservo en Tel Aviv (UK) [NDLR: Ĉu estis?] kaj la Diservoj kadre de la kristana kongreso en Ĉeĥio.

En la kadro de la Faulhabersemajnfino organizita de Esperanto **Nederland** en decembro okazis dimanĉa matena edifo en la preĝejo de la kongresejo. Jacques TUINDER estis denove preta gvidi ĝin.

Britio. En Bristol, Londono kaj Norda Kimrujo okazis monataj Diservoj en Esperanto. Kadre de la Brita Kongreso en Appleby-in-Westmore-land estis organizita Paska Diservo, la 23-an de aprilo.

Svedio. Edifo okazis kadre de la kongreso de la Sveda Esperanto-Federacio en Helsingborg. Kadre de la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Oostende (**Belgio**) okazis ekumena Diservo. Dum la jarkunveno de la **Litova** Esperanto-Asocio gvidis Erikas LAICONAS Diservon.

Sekcioj

La jarkunveno de la **Nederlanda** sekcio okazis la 15-an de aprilo en Utrecht. Post la jarkunveno sekvis distra programo al kiu pluraj membroj kontribuis. Jacques TUINDER postsekvis Adolf BURKHARDT kiel prezidanto de KELI, kvankam li estas ege okupita pro sia agado por la vidhandikapitoj ĉie en la mondo. Komence de la jaro 2001 havis la sekcio 27 membrojn de KUNE/KELI, 5 nur de KELI, 2 nur de KUNE kaj 4 familiajn membrojn. Estraro: Els VAN DIJK — sekretariino, Gerda DERCKS — kasistino, membroj: Nel VAN IPEREN kaj Leen HORDIJK. Wil VAN GANSWIJK kun sukceso instruis Esperanton pere de ŝia TTT-paĝo. Ankaŭ Gerda DERCKS instruis gelernantojn. Els VAN DIJK estis membro de la estraro de Esperanto Ne-

derland.

En Kaunas, **Litovio**, okazis ĉiun semajnon biblia studado. En 1995 komencis Erikas LAICONAS, la reprezentanto de KELI, la eldonon de la bulteno *Litovia Kristano*. Dum la jaro 2000 estis 3 numeroj eldonitaj. Pro ekonomiaj cirkonstancoj neniu persono povis vojaĝi eksterlanden.

La reprezentantino por **Rusio**, Belorusio, Ukrainio, Kazahstano estis Larisa KUZMENKO. Dek kvin membroj havis precipe per-leterajn kontaktojn. Estis apartaj renkontiĝoj inter samurbanoj. Pro la malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj neniu povis vojaĝi eĉ en sia lando. Multaj membroj ne povis aboni eĉ unu gazeton en sia propra lingvo. La klubanoj subtenis sian Ortodoksan Eklezion per helpo al malriĉuloj (malnovaj vestaĵoj, legomoj). Per *Dia Regno* ili sentis sin apartenantaj al la Kristana Esperanto-Mondo.

La jarkunveno de la **Brita** sekcio estis en Appleby, la 23-an de aprilo. Peter kaj Audrey HAYWARD estis la redaktantoj de *Kristana Alvoko* kiu aperis 3 fojojn en 2000. Estraro: prezidanto — David BISSET, kasisto — Tom NEIL, sekretariino — Yvonne KNOWLES. Komitatoj: Bruno NAJBARO, Edith SHELDRICK.

Olavi KANTELE el **Finnlando** eldonis 3 fojojn la *Cirkulero*-n, informilon por la finnaj membroj. La printempa kunveno okazis en marto kaj la aŭtuna kunveno en novembro en Helsinki. Prezidanto — Olavi KANTELE, kasistino — Soili SALMINEN.

La jarkunveno de la **Sveda** sekcio okazis en Helsingborg, la 20-an de majo. Estraro: prezidanto — Karl BUREMO, kasisto/membro administranto — Arne LUNDKVIST, sekretariino — Agneta JÄRLSTRÖM, membro — Stig KINNANDER. La ĉeestantoj de la jarkunveno akceptis la proponon pri ĉesigo de la

Sveda sekcio. Duan fojon oni, laŭ statuto decidis pri la malfondo dum la jar-kunveno de 2001.

La **Germanlingva Okumenisches Esperanto Forum** eldoniĝis dank' al pastoro Adolf BURKHARDT kaj pastro Bernhard EICHKORN. Ĝi estis regule sendita jam dum 10 jaroj kun la helpo de Endel OJASILD el Estonio kaj ĝi informis la Germanlingvanojn pri la Kristana Esperanto-Movado. Pastoro Adolf BURKHARDT kaj pastroj de IKUE kunlaboris en plia ekumena agado nome: la verkado de oficiala Diserva Libro de IKUE kaj KELI kies titolo estas *ADORU*. Adolf BURKHARDT daŭre funkciis kiel la granda instiganto de la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen. Bona novaĵo el Berlino estis la fondo de nova Kristana Esperanto-grupo. Estraro: prezidanto — pastoro Lothar BAUMGARTEN, kassistino — Astrid HANKE, sekretariino — Hella LANKA.

Francio. Dum somero Philippe COUSSON estis invitita en distrikta renkonto de la Reformita Eklezio en la Muzeo de Bois-Tiffrais, kie jam dufoje niaj kongresoj iris, por paroli pri KELI kaj Esperanto, helpe de Christine POUSSARD.

Finiĝas mia jarraporto. Se vi opinias ke mankas interesaj informoj, bonvolu sendi ilin al la redaktoro.

Els VAN DIJK

Estraro de KELI

Inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo. **Prezidanto:** Jacques TUINDER (2003), **vic-prezidanto kaj redaktoro:** Philippe COUSSON (2003), **sekretario:** Els VAN DIJK (2001), **kasisto:** Siegfried KRÜGER (2002), **membroj:** Irén BAGI (2003), Adolf BURKHARDT (2003), MA Youngtae (2001), Bengt Olof ÅRADSSON (2003), Pavel POLNICKÝ (2002), Britta REHM (2001), Geoffrey DOROW (2003).

KELI—prezidanto 'evidente' vojaĝos al Ukrainio PRIVATE

En la tagoj, kiam Vera kaj mi ĉeestis la 66-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en Plovdiv (Bulgario) — dum kies malferma ceremonio Fondajon „Evidente” per ora medalo distingis la prezidanto de la Bulgara Unuiĝo de Blinduloj — esperantistoj el Ukrainio diris al mi: „Ĉu vi neniam vizitis Ukrainion? Do iam venu al nia lando por helpi al multe da homoj kun vidproblemoj!”

Kaj dank' al la ĉielo mi trovis en mia loĝloko optikiston, kiu estas preta akompani min al la ĉefurbo de Krimo, Simferopolo. Kiam vi legos ĉi tiujn liniojn, jam pasis la tiea laborperiodo, okazonta de la 8-a ĝis la 20-a de aprilo. Ni ricevis oficialan inviton de la oficialaj instancoj en ukrainia lingvo kun paralela Esperanto-traduko. La internacia lingvo servos al ni tuj ĉe alveno en la flughaveno kaj cetere dum la tuta programo kiun preparos estraranoj de la Ligo de Blinduloj en Krimo. Dum nia aktivado, kiu daŭre konsistas el mezurado de okuloj, ni ĉiam bezonos la ĉeeston de interpretistoj.

Jes, por mi estas la unua vizito al tiu lando ekonomie malforta sed historie, kulture kaj literature riĉa. Optikisto Co CROESE kaj mi pilgrimos al la lokoj, kie Florence NIGHTINGALE postlasis siajn piedsignojn en la tempo de la terura milito, kiu meze de la 19-a jarcento kruele skurĝis Krimeon.

Dum la pasintaj monatoj mi sendis centojn da muntumoj kaj okulvitroj por legado al la invitinta organizaĵo, kiu finresponsas pri nia misio. Nia in-

tenco estas helpi al la plej forgesitaj homoj, unualoke infanoj, en la lando kiu dekojn da jaroj apartenis al Sovetunio. Ĉiutage oni nin povos trovi en infanhejmaj, orfejoj, institutoj por gelernantoj aŭd- kaj vid-handikapitaj, maljunulejoj, laborejoj por handikapitoj, psikiatria kliniko, malliberejoj, ktp., kie Co vidos centojn da klientoj kaj mi administracie kaj alimaniere asistos. Ĉiu kiu bezonas okulvitrojn povas mem elekti plaĉan montumon, kiun ni poste — kune kun freŝa recepto — reprenos Nederlandon. Povas temi pri 400–500 optikistaj priskriboj; post nia misio pluraj optikistoj en nia lando enigis la vitrojn laŭ la indikita dioptrio. Tio signifas ke ni devos 'bombardi' la optikan industrion per ardaĵpetleteroj.

Kompreneble nia intenco nepre ne povas esti nelojale konkurenci kaj ŝteli panon de la tieaj optikistoj. Ni iros al tiuj homoj malforte vidantaj, al kiuj simple mankas mono por peti helpon de siaj propraj specialistoj. Ni klopodas serĉi la tiel nomatajn 'neglektitajn grupojn'.

Co prenos kun si aparataron kiu en la pasintaj jaroj bonege servis en Albanio, Kosovo, Rumanio kaj Srilanko. El la lasta lando ĵus revenis mia nederlanda amiko Eli HOSSEVOORT, kiu jam trifoje optikistis en la loko, kie „Evidente” estas konstruanta instituton por vidhandikapitaj infanoj kombine kun internulejo. Mi tuj parentezu, ke ankaŭ en alia loko de Sri-lanko kie loĝas Tamiloj, ni planas konstrui similan lernejon. Grandan financan helpon ni ricevas de la organizaĵo „Sovaĝaj Anseroj”, kiu ekzemple ankaŭ forte kontribuas plibonigi la mizeran staton de la Plovdiva Rekapabla Centro, kies di-


rektoro estas fervora esperantisto. Dua grandega sponsoro estas la Ekologia Bonfarcela Revendejo en mia loĝloko, kie mi plezure jam dum serio da jaroj volontulas.

Tre varman kaj sinceran dankon mi esprimas al la komunuma estraro de Heemskerk, kiu jam por la oka fojo donis monan subtenon al nia nova projekto en Ukrainio. Ankaŭ kelke da esperantistoj alportis brikon, sed mi konstata statistike, ke la plej granda parto de niaj geelpantoj parolas nederlande lingvon de espero, kvankam (ankoraŭ) ne 'la bonan lingvon'.

En la hodiaŭa momento por komplika korkuracado gastas en nia lando la subdirektoro de la Tirana blindulejo, sub kies tegmento ni jam dum pli ol ses jaroj havas niajn helpoprojektojn. Nune ni preparas ekipaĵon por manlaboro cele al la blindaj gelernantoj, enkondukanta modestan preparon al postlerneja profesie aktiva vivoperiodo.

Laste mi petas vian helpon por (tre verŝajne nenece) blinda virino en Bulgario kiu operacieblas en Antverpeno.

Jacques TUINDER
28-03-2001



Ege kontenta mi estas rilate al la kontakto kun Jerry VEIT. Mi ĝuas lian servon „365 tagoj kun la Biblio”. Mi jam kelkfoje reklamis la servon al konatuloj kaj miras, ke nur malmultaj aliĝas. La homoj estas sufiĉe plenshopitaj kaj ofte rifuzas pli. Tamen, ricevi biblian vorton ĉiutage el Usono, senkoste kaj en nia ŝatata lingvo, tion mi ne plu volas malhavi. Certe mi ankaŭ legas nacilingvan ĉiutagan signalvorton, sed intertempe mi preferas la esperantan. Tio estas ankaŭ bona lingva ekzercado tute ne temporaba.

Intertempe Jerry sendas la mesaĝon per „egroups” kaj la membroj povas ankaŭ kontakti la grupon. Mi ja ne estas sperta en „egroups” kaj nur komencis iomete vagadi en interreto. Surprizis min ilia nombro, esperantaj estis 160. La grupo de IKUE havas pli ol 50 membrojn. En iu grupo mi estis trovinta mesaĝon de Wil VAN GAN-SWIJK, kiu pledis por la restado de Zamenhofstrato en iu urbo, ties nomon la urba konsilantaro intencis ŝanĝi. Ŝi certe povus raporti al vi pri iliaj interretaj spertoj kaj eble ĉi tiu letero instigas ŝin.

Siegfried KRÜGER

Nuntempe 365 Tagoj el la Biblio havas 28 membrojn. 12 membroj (dek plus mi mem dufoje — per mia hejma kaj oficeja komputilo) estas jam registritaj en la „nova” servo pere de Yahoo (antaŭe eGroups). 16 membroj restas sub la „malnova” sistemo kaj mi ankoraŭ devas sendi la mesaĝojn al ili

unuope. Iom post iom, ĉiuj membroj estos en la nova grupo (ĉe Yahoo), kiu iomete faciligos la laboron por mi. Mia anglalingva grupo same havas 28 membrojn. Do, ĉiutage la Bibliaj mesaĝoj atingas pli malpli 56 komputilojn (28 en Esperanto, 28 en la anglalingva versio).

Mi jam amplekse reklamis por 365 Tagoj el la Biblio, inter alie per mia hejmpaĝo, kiu jam ekzistas ekde decembro de 1999. La hejmpaĝo mem havas averaĝe 20 vizitantojn ĉiusemajne (ne nur Esperantistoj, kompreneble). Vi eĉ povas vidi statistikojn (nederlandlingve!) pri mia hejmpaĝo per klicko sur la malgrandeta kesteto maldekstre preskaŭ ĉe la FINO de la ĉefpaĝo (iru al: <http://www.execpc.com/~jveit/>). Fakte, mi estas sufiĉe kontenta pri la hejmpaĝo, ĉar sufiĉe da vizitantoj venas el multaj landoj por vidi ĝin. Sed verŝajne estas malmulte da Esperantistoj. Aŭ eble la Esperantistoj simple ne interesiĝas pri Kristo kaj pri la Biblio, ĉu? Fakte mi demandas min, ĉu estus pli efike dediĉi mian laboron al nacilingvanoj. Eĉ la KELI-anoj ŝajne ne tiom interesiĝas pri 365 Tagoj el la Biblio, kiu laŭ mia scio estas unikaĵo en Esperantujo.

Amike via,

Jerry VEIT

365 Tagoj el la Biblio

Vendredon, la 16an de marto 2001

Jen la hodiaŭa mesaĝo por vi el la Biblio:



Sed se via malamiko malsatas, donu al li manĝi; se li soifas, donu al li trinki; ĉar tion farante, fajrajn karbojn vi kolektos sur lia kapo. Ne venkiĝu de malbono, sed venku malbonon per bono.

Romanoj 12:20-21

Por sendi mesaĝon al ĉiuj registritaj membroj de la grupo:

365tagojellabiblio@yahoo.com

Por aboni: 365tagojellabiblio-subscribe@yahoo.com

Por malaboni: 365tagojellabiblio-unsubscribe@yahoo.com

Por atingi min (Jerald Veit): jveit@execpc.com

Por legi la antaŭajn mesaĝojn de la jaro 2001:

<http://groups.yahoo.com/group/365tagojellabiblio/>

JUBILEO

La 24-an de marto nia eks-prezidanto Henk DE HOOG havis sian datrevenon: la 91-an!

Ne forgesu lin, ĉar li tiel multe laboris por Esperanto kaj KELI. Neimageble, lia kono de Esperanto estas perfekta.

ESPERO KATOLIKA

KELI-anoj povas aboni al la revuo *Espero Katolika*, je reduktita prezo (12,50) pere de la KELI-kasisto (kaj pere de la vialanda KELI-peranto). Nepre profitu la okazon legi la plej malnovan daŭre vivantan revuon en Esperanto, nian partneron en ekumeneco.

Silaba krucvortengimo

| | | | | | | | |
|----|---|----|----|----|----|----|---|
| | 1 | 2 | 3 | | 4 | | 5 |
| 6 | | 7 | | 8 | | | |
| 9 | | | 10 | | | 11 | |
| | | 12 | | | 13 | | |
| 14 | | | | 15 | | | |

kromsolvo

| | | |
|----|---|---|
| 12 | 3 | 5 |
|----|---|---|

Horizontale: 1. malkovra, 4. iama ora monero, 7. diservaranĝo, 9. malgranda rongulo, 10. kunigas kapo kaj trunko, 11. plue estante, 12. eksmoda pres-maŝino, 14. japana tradicia vesto, 15. membro de migranta tribo,

Vertikale: 2. veturigi boaton per vento, 3. scio pri naturo, 4. opo de du aferoj, 5. inklino allasi aliajn pens- aŭ ag-manieron, 6. konigi, 8. maŝino por senkapigi kondamnitajn, 12. pagilo, 13. arbofrukta.

Kromsolvo: jarparto.

Fritz LAUTENBACH

Solvo de la vortserĉludo (826)

Horizontale: Tomaso, Johano, Petro, Mateo, Filipino, Simono.
Vertikale: Andreo, Jakobo, Paŭlo.
Diagonale: Bartolomeo.

DUMMILITA INCIDENTO

„...kaj novan spiriton Mi enmetos en vin, kaj Mi elprenos el ilia korpo la koron ŝtonan kaj donos al ili koron karnan, por ke ili sekvu Miajn leĝojn kaj observu Miajn decidojn kaj plenumu ilin” (Jeĥezkel 11:19-20).

La militkaptitoj marŝas tra la urbe-to. Iliaj vizaĝoj respegulas la katastrofon de la lastaj horoj. Nun ili marŝas al nekonata celo, sen forto, sen espero, elĉerpitaj kaj kun malplenaj stomakoj. Kelkaj el ili estas vunditaj kaj ili marŝas hezite per la helpo de la kamaradoj.

Aliaj falas kaj restas en la griza neĝo sur la strato.

Ĉe la flankoj de la iranta homfluo, la soldatoj gardas la malamikajn kaptitojn, kaj ofte donas batojn per la pugno aŭ la fusilo al tiuj, kiuj marŝas tro malrapide. Piedbatoj estas rezervataj por tiuj, kiuj falas kaj kuŝas sur la tero.

La loĝantaro de la urbeto staras ĉeflanke de la strato kaj silente rigardas la scenon. Indiferentaj, ili sperdas nek amon nek malamon por la militkaptitoj aŭ por la soldatoj gardantaj ilin. Ankaŭ ili jam sufiĉe suferis dum tiu terura milito, kaj ŝajne ne plu ekzistas homaj sentoj de kompatato aŭ amikeco en iliaj koroj.

Neatendite, malgranda, iom magra knabo subite forlasas la alrigardantan homamason kaj kuras rekte

al unu el la militkaptitoj, al unu, kiu aparte elstaras pro granda malpura bandaĝo ĉirkaŭ la kapo. La patrino reagis tro malrapide por haltigi la knabon. Li jam atingis la militkaptiton kaj haste ŝovas pecon da pano en lian manon. „Für dich”*, la knabo kuraĝas diri. „Spasiba”**, respondas danke la militkaptito. La knabo ne komprenas la fremdan vorton, sed kaj li kaj la militkaptito ridetas unu al la alia.

Ĉiuj ŝajnas esti ŝokitaj per tiu okazaĵo — la militkaptitoj, la gardistoj kaj la urbanoj kvazaŭ haltas sen-spire, senmove dum ĉiuj okuloj restas fiksataj sur la knabeto.

Post longa momento denove ĉio estas normala. Tamen io ŝanĝiĝis. Ŝajnas, ke la urbanoj nun alrigardas kun iom malpli indiferenta mieno. Ŝajnas, ke la soldatoj iom malpli ofte kaj malpli furioze batas la militkaptitojn. Kaj subite la fremdaj militkaptitoj, tiuj, kiujn oni nomis „sub-homoj”, havas **vizaĝojn**, ili ne plu aspektas kiel nura amaso da suferanta karno.

Blanka neĝo ekfalas kaj la militkaptitoj plu marŝadas, la soldatoj gardas, la homoj staras ĉeflanke de la strato kaj alrigardas. Okazis eta miraklo, malgrava incidento dum granda milito.

Jerald VEIT

* germane: Por vi

** ruse: Dankon